

AMOVORTOJ SURSABLE

J. Fred Coots / N. & C. Kenny

Esperantigo: Emanuele Rovere

Sur la sablon de l' mar' kutimis skribi ni
dolĉajn vortojn pri nia Amo.

Vi desegnis por mi dometon, du korojn
kaj mi skribadis: mi amas vin.

Sed, en sensuna tag', ekblovis venteg'
kaj dispelis por ĉiam
la amorevon nian.

Sur la sablo de l' mar, sub varma kaj brila sun',
pensoj vagas sen plu amorevoj nun.

Sur la sablo de l' mar', sub varma kaj brila sun',
plu ne estas temp' por amorevoj nun.